Adiaû

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Adiaû amik', adiaû
Jam temp' por disiĝi venas
Por longa memoro vian
Donacu al mi manpremon.

Donacu ankoraû kanton
Memoru mi voĉon vian
Rigardu okulojn antaû
Mi diros al vi, mi diros al vi:
Adiaû!

Donacu vi ankaû por vojo
La varman rideton vian
Kaj kisu vi min lastfoje
Adiaû amik', adiaû.

Tre zorge mi ĉion prenos
Kaj metos en koron mian
Jam temp' por disiĝi venis
Adiaû amik', adiaû amik',
Adiaû!